„Kuraĝe antaŭen

Aŭstria Esperantisto

tra la mondo!“

(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Int. Esperanto-Muzeo, Aŭstria Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Varbadservo por Aŭstrio

Jarabono (komencebla ĉiumonate) por Aŭstrio ŝ 4.60, pagebla ankaŭ en partpagoj (½ j. ŝ 2.35), aliaj landoj sv. fr. 4.25 (9 resp. kup. poŝtaj); ponumere 45 g (1 resp. kup.).

Aperas la 5. de ĉiu monato. **Leteradreso:** Wien, I., Neue Burg (Tel. R-27-803). Manuskriptojn ni nur resendas kun reafranko. Poŝtŝparkaso-konto D-123.826.

Ne ĝustatempa malmendo de nia gazeto devigas al plupago de la jarkotizo por la sekvonta jaro.

N-ro 1 (138) | **Korneuburg ĉe Wien, la 5. januaro 1937.** | **14. jaro**

„DER ÖSTERREICHISCHE ESPERANTIST.“

Geleitwort von Bundeskanzler **Dr. Kurt Schuschnigg.**

Der kühne Versuch der Esperantisten, jene Grenzen zu überwinden, die durch die Verschiedenheit der Sprachen gezogen sind, fand anläßlich des letzten internationalen Esperantokongresses in Wien überzeugenden Ausdruck. Möge der Jubiläumskongreß, den die internationale Esperantistenbewegung im Jahre 1937 in Warschau feiert, abermals ein schöner Erfolg werden.

Mit besonderer Freude gedenke ich hier der Verdienste, die sich die österreichische Esperantobewegung unter Führung ihres Präsidenten erworben hat. „Der österreichische Esperantist“, der nunmehr in erweiteter Form in 60 Länder hinausgeht, hat schon bisher viel dazu beigetragen, im Auslande falsche Vorstellungen über

Oesterreich zu berichtigen und unserem Vaterlande Freunde zu werben. Ich begrüße es, daß er nunmehr in verstärktem Maße sich anschickt, in aller Welt das Interesse des Esperantisten und seiner Freunde für die Kultur und die Schönheiten unserer Heimat zu wecken und das österreichische Volk und seine Eigenart den Angehörigen anderer Völker näherzubringen. Das ist der richtige Weg, um zur Völkerverständigung zu gelangen.

Der Esperantistenbewegung und ihren Mitgliedern als Pionieren auf dem Wege zur Befriedung der Völker wünsche ich allen Erfolg für die Zukunft. Sie haben ein Anrecht darauf, daß die Oeffentlichkeit ihrer stillen und doch so fruchtbaren Arbeit mit Interesse begegnet.

„AŬSTRIA ESPERANTISTO.“

Akompanaj vortoj de Federacia Kanceliero de Aŭstrio **D-ro Kurt Schuschnigg.**

La kuraĝa provo de la esperantistoj, superi tiujn limojn, kiuj estas starigitaj pro la diverseco de la lingvoj, trovis okaze de la lasta internacia Esperanto-Kongreso en Wien konvinkan esprimon. La Jubileo-Kongreso, kiun la internacia Esperanto-movado en la jaro 1937 festos en Varsovio, denove fariĝu bela sukceso.

Kun speciala ĝojo mi memoras je ĉi tiu okazo pri la meritoj, kiujn la aŭstria Esperanto-movado akiris al si sub la gvidado de sia prezidanto. „Aŭstria Esperantisto“, kiu nun en pli granda amplekso eliras en 60 landojn, jam ĝis nun multon kontribuis al ĝustigo de falsaj ideoj pri Aŭstrio en la eksterlando kaj al varbado de amikoj por nia partolando. Mi ĝojas, ke ĝi nun en pli granda dimensio komencas veki en la tuta mondo la intereson de la esperantistoj kaj de iliaj amikoj por la kulturo kaj la belajoj de nia patrolando kaj pli proksimigi la aŭstrian popolon kaj ties individuecon al la anoj de aliaj popoloj. Tio estas la ĝusta vojo, por veni al la interpopola kompreno.

Al la Esperanto-movado kaj al ĝiaj membroj kiel pioniroj sur la vojo al la interpaciĝo de la popoloj mit deziras ĉiun sukceson por la estonta tempo. Ili meritas, ke la publika opinio interesiĝu pri ilia modesta sed tamen tiom fruktodona agado.

Patriota Fronto de Aŭstrio.

Originala artikolo de **Hans von Becker**, estro de varbooficejo de P. F.
Trad. kaj prelegita el Radio-Wien de oficKons. **Carl von Gasperini.**

Aŭstrio estas aŭtoritata ŝtato, sed ne diktatora reĝimo. Tiu konstato signifas en sia unua parto malakcepton de tiu pseŭdodemokratio de iam antaŭe, kiu ja ŝajnigis al la aŭstria popolo, havi la rajton je kundecido en politikaj aferoj, sed efektive estas nenio alia ol la parlamentara formo de batalo pri potenco de ekonomie interesitaj grupoj en la ŝtato kaj pro la ŝtato. En sia dua parto tiu konstato signifas malakcepton de ĉiuspeca popolfremda aŭ eĉ kontraŭpopola perforto: La aŭtoritata registaro de Aŭstrio ne estas aŭtokratio sed ĝi estas pri siaj agoj entute respondeca.

Kiam kanceliero Dr. Dollfuß komencis novkonstrui la aŭstrian ŝtaton sur profesi-korporacia bazo, li devis krei institucion, destinatan por anstataŭi la antaŭajn partiojn. La ideo, grupigi la en klasoj kaj partioj disigitan aŭstrian popolon ĉirkaŭ la naturaj centroj de la societo, ĉirkaŭ laboro kaj profesio, estis unuavice sociala, ekonomia ideo. Ĝi nepre postulis politikan kompletigon, por eviti, ke la aŭtoritata ŝtato fariĝu diktatora reĝimo.

Estus estinta eraro, transigi la funkciojn de la politikaj partioj al la profesiaj korporacioj. Ĉar estis ĝuste la intermikso de ekonomiaj interesoj kun politikaj motivoj, kiu siatempe venenis la politikan vivon en Aŭstrio. Purigi la politikan vivon, tio estis la celo de kanceliero Dollfuß; kaj tio ne estus sukcesinta, se la politikaj partioj estus restariĝintaj en la profesiaj korporacioj. Tiuj-ĉi devas — laŭ la intencoj de Dollfuß — reguli aŭtonomie siajn proprajn kaj al ili esencajn aferojn, sed ili ne enmiksu sin en la politikon.

Estus estinta simple — eĉ tro simple — lasi la formadon de la politika volo nur al la respondecaj reprezentantoj de la politika potenco. Aŭstrio estus facile povinta imiti la ekzemplojn, kiuj jam surpašis tiun vojon. Sed tiu-ĉi solvo ne estus konvena al la naturo de l'aŭstriano. Tial Dollfuß kreis Patrolandan Fronton kiel solan reprezentanton de la politika volo en la ŝtato. Kundecidi en politikaj aferoj estas rajto de ĉiu, kiu havas pozitivan koncepton pri la ŝtato kaj volas labori por sendependa, kristana, germana, laŭprofesie organizita Aŭstrio.

Iom pripensante oni komprenas, ke la limigo de la rajtigitoj al kunlaboro en la ŝtata vivo, ne estu konsiderata kiel nedemokrata elemento, sed nur kiel memkompreneblo. Kie en la mondo ekzistas unuiĝo aŭ societo, kiu permesas al siaj kontraŭuloj kundecidon en la ordigo de la societaj aferoj? Kaj kial ĝuste la ŝtato faru tiurilate escepton kaj faciligu la disigan kaj detruan laboron de siaj kontraŭuloj?

Kontraŭ tio oni povus argumenti: La aneco al iu unuiĝo estas libervola, sed la ŝtataneco estas ennaskita. Nu, oni do montru al ni la demokratan ŝaton, kiu toleras partion kun programo pri detruo de la ŝtato.

Dua argumento: Patrolanda Fronto estas la sola representanto de politika volo; kiu havas alian koncepton pri la ŝtato, do ne havas la eblon de politika organizo.

Ankaŭ tiu argumento estas refutebla. La kadro de la Patrolando Fronto estas tiom vasta, ke ĉiuj opinioj kaj tendencoj, supoze ke ili ne neas la ŝaton, trovas en ĝi spacon. Ano de Patrolanda Fronto povas estis monarĥisto aŭ respublikano, li povas sin deklari por la germana popolo aŭ por iu nacia malplimulto, li povas aparteni al ĉiu agnoskita religia komunumo, sen sperti pro tio domaĝon en siaj politikaj rajtoj.

Fine estas pridubata entute la ebleco formi politikan volon. Se oni komprenas sub tio la rajton krucsigni balotilon post akra elektobatalo, kies lastajn impulsojn la simpla viro neniam komprenos, ne konante la sekretajn fadenojn, kondukantajn de la ekonomiaj potencogrupoj al la politikaj partioj, se oni rigardas tiun solan rajton de la ŝtatano de iamaj tempoj kiel „formadon de politika volo“, tiam tiu-ĉi dubo estas prava. Ankaŭ alia rajto ne plu ekzistas en la aŭtoritata ŝtato: La rajto de la deputitoj, prezenti sub la ŝirmo de l'imuneco ne plenumeblajn postulojn kaj ataki la registaron por konservi al si la favoron de la elektantoj.

Kontraŭe en la aŭtoritata ŝtato ĉiu ŝtatano rajtas en la kadro de Patrolanda Fronto eldiri libere kaj sen ia malhelpo siajn dezirojn kaj plendojn. Li kompreneble ĉe tio observu la decajn formojn kaj ne perdiĝu en demagogiaj frazajoj. Sed li povas esti certa, ke liaj deziroj estos akceptataj kaj laŭeble plenumataj. Sen grandaj parlamentaj debatoj, sen patosaj paroladoj, diratoraj nur por la amasoj. Eble en tiu institucio leĝe fiksita en la intervena rajto de P. F. enestas pli da demokratio ol en la elektobataloj de l'antaŭa tempo.

Sed la politiko ja ne estas precize limigita kampo, ekzistanta nur por si mem. Ĝi tuŝas ĉiujn vivosferojn, ĝi influas ĉiujn vivomanifestadojn kaj estas reciproke influta de ili. Se ni do parolis pri la disigo de politiko kaj ekonomio, tio tiamplene signifas, ke per la profesi-korporacia novkonstruo estu forigata la malutila perforta plenumigo de ekonomiaj interesoj per politikaj potencrimedoj — alie dirite: la korupto en la ŝtata vivo. Sed per tio ni ne intencas pledi por iu „vivisekco“ de la ŝtato. La efektivaj, naturaj interrilatoj de la diversaj vivosferoj ne devis esti malligataj, ankaŭ ne malfirmigataj. Nur la nenaturaj intermiksoj devis esti forigataj, tiuj intermiksoj kiuj igis la politikan vivon ne travidebla kaj korupta.

Ankaŭ el la vidpunkto de la profesiaj korporacioj ekzistas specialaj politikaj problemoj, pri kiuj P. F. estas kompetanta. Por solvi tiujn problemojn estas fondita la subfakoj de la P. F.: La poroficeja organizaĵo, kaj la porentreprena organizaĵo. La unua defendas la rajtojn de la oficistaro, la alia zorgas en la unuopaj entreprenoj por la realigo de la socialaj principoj, sur kiuj baziĝas la nova Aŭstrio.

Sed ankoraŭ pli vasta estas la taskaro de P. F. Ĝi ne elĉerpiĝas pritraktante aktualajn politikajn problemojn; la reprezentanto de la politika volo interesiĝas



Historia bildo: Akcepto de la reprezentantoj en la Internacia Konferenco „Esperanto en la lernejojn kaj la praktikon“ 1934 en la salonegoj de Instruministeriejo. Sidantaj: de md.: kalk. kons. R. M. Frey; prof. d-ro Ódo Bujwid-Kraków; tiama kanceliero d-ro ENGELBERT DOLLFUSS †, FONDINTO DE PATRIOTA FRONTO; kortega konsilisto Hugo Steiner, prez. de la Konferenco; tiama instruministro kaj nuna kanceliero d-ro KURT VON SCHUSCHNIGG, GVIDANTO DE PATRIOTA FRONTO; direktoro Robert Kreuz †; sekcia ĉefo d-ro Fr. Uebelhör.

ankaŭ pri la estonteco de la popolo. Tial estas fonditaj la kromverkoj de P. F., kiuj zorgas pri la familio kaj la idaro: La „porpatrina helpverko“, la „porinfana ferioverko“ kaj la organizaĵo „Oesterr. Jungvolk“ = Aŭstria Junularo.

La porpatrina helpverko celas protekti la familion kiel ĝermon de la ŝtato: la verkon subtenas helpante kaj kompletigante la porvirina referato de P. F.

La porinfana ferioverko ebligas al la grandurba junularo surkamparan restadon, zorgante tiamaniere pri bona sanstato de la idaro.

La frontverko „Aŭstria Junularo“ edukas la junularon al fideleco al la ŝtato kaj al amo al la patrujo, metante per tio fundamenton por nova generacio, kiu nenion plu scias pri la fatala malunueco, je kiu la patrujo suferis dum tiom da jaroj.

Nova kaj grava verko estis kreata en la frontverko „Nova Vivo“. En tiu ĉi verko kuniĝas ĉiuj ideoj kaj institucioj, kiuj celas la nepre necesaj vivokondiĉoj montras la vivocelon koncernantan la tutan homon, ne nur la produktantan kaj la politikan homon.

La frontverko „Nova Vivo“ plene meritas sian nomon. Io vere renoviganta estas al ĝi esenca. Ĝi estas pli ol nura „utiligo de postlabora tempo“, kvankam ĝi en la praktiko ĉefe celas, ebligi al la ŝtatano konvenan utiligon de lia postlaboro tempo, de liaj ripozhoroj.

Sporto, vojaĝado, migrado, sed ankaŭ arto, muziko, diletanta teatro apartenas al la taskaro de la „Nova Vivo“. Io esenca mankus al la tipa aŭstrieco de P. F., se tiu institucio „Nova Vivo“ ne estus estinta kreita. Ĉar estas esence tipa por l'aŭstriano, ke li ne nur produktas kaj laboras, sed ankaŭ formas sian privatan vivon kaj el la utiligo de sia libera tempo ĉerpas efikajn fortojn por la ĉiutaga vivo.

Oni povas dum horoj fari iun laboron kaj forgesi ĝin post laborĉeso. Sed oni ne povas dum horoj esti aŭstriano kaj por la resto de la tago eliĝi el la popola kaj ŝtata komuneco. Tion ekkoninte, „Nova Vivo“ volas servi la aŭstrian popolon dum ĝia libera tempo. Notu bone: Servi, sed ĉute ne forpreni ĝian liberan tempon kaj meti ĝin ankaŭ post laborĉeso sub ian devigon.

La transpreno de „Aŭstria porarta centro“ ebligas al tiu frontverko peri la vizitadon de artaj institucioj precipe de teatroj je malaltigita prezo. La fundamento por populara diletanta teatromovado estis kreata. Senmonaj oficantoj de P. F. ricevas de „Nova Vivo“ la eblecon de senzorga libertempo. La migrado kaj vojaĝado estas kulturataj same kiel ĉio, kio celas la korpan plitaŭgigon.

Estu vere nova vivo, kiu ĝermas kaj burĝonas en la nova Aŭstrio. Ĉio ebla estas farata, por ke pli kaj pli praviĝu la poeto dirante: L'aŭstriano havas patrujon, li amas ĝin kaj plenmotive amas ĝin!

Tiel P. F. estas ĉionampleksanta organizaĵo, kiu ne nur la politikan homon, sed en subfakoj kaj helpverkoj ekprenas la tutan homon, ligante lin al la patrujo. La maniero, laŭ kiu tio okazas, tamen montras, ke la ruĝa-blanka-ruĝa rubando ne signifas nun **devigon**, sed la **liberan, veran amon** al la patrolando AŬSTRIO.

Vojo kaj celo de la aŭstria ekstera politiko.

Laŭ la informoj de Federacia Kancelierejo „Bundeskommissariat für Heimatdienst“.

Nia ekstera politiko havas du celojn: Konservado de nia ŝtata memstareco kaj konservado de la eŭropa paco.

Ĉi tiu celado estas la eksterpolitika testamento, kiun heredigis al ni la renoviginto de Aŭstrio, la elmondiĝinta kanceliero d-ro Dollfuß kaj kiun daŭrigas rektlinie kaj nesanĝite lia sekvinto kanceliero d-ro Schuschnigg.

Estas historia kaj politike centfoje konstatita fakto, ke la aŭstriano pro siaj ecoj kaj maniero estas farinta al la germanismo netakseblajn pionirservojn kaj ankoraŭ estas destinita fari tiajn. Tion la aŭstriano nur kapablas fari estante sendependa aŭstriano.

Kun ĉi tiu unua celo ankaŭ la dua estas nedisigeble ligita: la konservado de la eŭropa paco, kaj ĉiu scias, ke Aŭstrio ĝuste pro sia energia politiko koncerne sian sendependecon grandparte, ja eble en decidiga mezuro kontribuis al la konservado de la eŭropa paco.

Okaze de la Konferenco de la tri ŝtatoj Aŭstrio, Hungarujo, Italujo nia ŝtatsekretario por eksteraj aferoj d-ro Guido Schmidt diris: „Du fortaj kolonoj portas la politikon de Aŭstrio: la neskuebla volo, konservi nian sendependan ekzistadon kaj fortigi ĝin — ĉi tiu fundamenta regulo felice ĉesis esti problemo kaj fariĝis jam dogmo de la internacia vivo — kaj nia senlaca celado, plifortigi la rilatojn de amikeco kaj kunlaboro kun ĉiuj civilizitaj ŝtatoj, speciale kun niaj najbaroj.“

La aŭstria-germana kontrakto de 11. julio pritraktas en siaj tri punktoj la rekonon de la plena ŝtata sendependeco de Aŭstrio flanke de la Germanregno, la rezignon pri enmiksado en la internan politikon de la alia ŝtato, je kiu okazo la aŭstria nacisocialismo precize estis deklarita flanke de la Regno kiel nura internpolitika afero de Aŭstrio, kaj fine la deklaro de ambaŭflanka preteco, aranĝi tiujn rilatojn, kiuj estas naturaj inter la du germanaj ŝtatoj.

La julio-kontrakto estas preskaŭ la laŭvorta plenumo de la Dollfuß-programo, la senescepta plenumado de lia politika testamento.

La senlaca kaj firma volo je plukonstruo flanke de la patrolanda Aŭstrio ne nur sukcesis en Aŭstrio mem, sed ĝi trovas ankaŭ ĉe la kompetentaj instancoj de la Germana Regno ĉiam pli da kompreno.

Ankaŭ la pliintensigo de la reciprokaj ekonomiaj rilatoj estas atingita, kaj la normaligo de la aŭstri-germanaj rilatoj estas sur la ĝusta vojo.

La urbestro de Wien skribas al Japanujo en Esperanto.

Al Nagoja Esperanto-Ligo en Nagoja, Japanujo.

Tre estimataj sinjoroj!

Mi ricevis vian ŝatatan leteron, per kiu vi min invitis al partopreno en la Pacifico-Ekspozicio, okazonta en printempo 1937 per helpo de Esperanto en via urbo.

Mi dankas pro via afabla invito kaj salutas la japanajn esperantistojn, kiuj venos al Nagoja, kaj ĉiujn aliajn vizitantojn de ĉi tiu grava aranĝo plej sincere.

Mi estas konvinkita, ke Esperanto multon kontribuos, ligi pli intimajn spiritajn kaj kulturajn rilatojn inter la urboj de okcidento kaj tiuj de la malproksima oriento.

Al la Ekspozicio mem, kiu servu al la paco, mi deziras plenan sukceson.

Wien, 4. januaro 1937.

La Urbestro de Urbo Wien:
Richard Schmitz.

Mondlingva demando en aŭstralia Senato.

En aŭgusto 1936 okazis en Kopenhagen mondlingva konferenco, invitita de **International Auxiliary Language Association** (IALA). S-ino Morris, edzino de la usona ambasadoro en Bruxelles, scipovante ankaŭ E.-on, estas la animo de IALA, kies speciala flanko estas la scienca esplorado, kiu lingvo aŭ lingvoprojekto estu ĝenerale enkondukota.

Senatano Abbott en Aŭstralio okupas sin pri la sama problemo sed laŭ la praktika flanko. Lia propono, ke la registaroj de la mondo faru internacian Konvencion pri la instruado de unu lingvo (ĉu nacia aŭ alia) en ĉiuj lernejoj de la mondo, por ke la homoj de diversaj nacioj komprenu sin reciproke kaj por ke per tio estu kreata la fundamento por pli konstanta paco, estas en la Aŭstralia Senato akceptita per 19 kontraŭ 5 voĉoj. La propono estu submetota al Ligo de Nacioj.

Kelkaj frazoj el la parolado de s-ro Abbott antaŭ la Senato: „La radioinĝenieroj brupetegas ĉi tiun idealaĵon. S-ro Fisk (Amalgamated Wireless) atentigas, ke 150 milionoj da homoj estus alparolataj en siaj propraj hejmoj, se ili komprenus komunan lingvon.“ „La temo tuŝas ĉiun personon en la mondo, ĉiun partion en la mondo, ĉiun entreprenon en la mondo. Ni ne povas havi internacian komercon kaj firman interrilaton inter la mondnacioj, se ni ne havas pacon; ni nur havos pacon ĝis kiam ni havos internacian komprenon, kiu ekestos nur pere de internacia interkomprenilo! Ĉi tio ne estas nura revo de fantaziulo; ĝi meritas la atenton de popoloj tra la civilizita mondo. La nuna japana ĉefministro, dum li estis ministro por eksteraj aferoj, diris, ke komprenmanko naskas suspekton kaj malamon inter nacioj kaj ke ĝi estas la plej produktema kaŭzo de milito. ... Se la mondnacioj konsentos la principon de mia propono, ili povos plenumi ĝin tiel facile kiel ili efektivigis Internacian Patent- kaj Poŝt-Konvenciojn. ... La mondo serĉas vojon al paco. Ĉu ni devas malagi nur pro timo, ke tiuj, kiuj nin ne komprenas, mokridus pri niaj klopodoj? Aŭ ĉu ni, pere de nia voĉdono, elsendu Ideon en la mondon? Mi sola ne kreis la ideon. Ĝi estas Voĉo, kiu aŭdiĝas en multaj mondpartoj. Ĉu ni ne elsendu al la Vokantoj mesaĝon de subteno en ĉi tiu movado?“

Ni esperu, ke Esperanto fariĝu ĉi tiu lingvo!

Red.

„Aŭstria Länderbühne“ de Patriota Fronto (V. F.) helpverko „Nova Vivo“.

Originala artikolo de d-ro **Rudolf Henz**, federacia gvidanto de V. F.-helpverko „Nova Vivo“.
Trad. kortega kons. d-ro **Oskar Bastl.**

En la larĝa kadro de la diversaj aranĝoj en granda formato de V. F.-helpverko „Nova Vivo“ „Aŭstria Länderbühne“ (migranta teatro por la aŭstria landaro) transprenis antaŭ du monatoj, jam okaze de ĝia fondiĝo kaj organizado, ege vivantan kaj urĝe necesan kulturtaskon en la nova

La transportveturilo de „Länderbühne“, kiu enhavas la dekoraciojn, kostumojn ktp. por la unuopaj prezentadoj, sur speciala vagono de Aŭstriaj Federaciaj Fervojoj. Antaŭ ĝi la administranta direktoro de „Länderbühne“ Julius Egon Kaiser.

Aŭstrio. Oni do devis vidi en la lastaj jaroj ĉiam pli kiel mekanikaj reproduktaĵoj de muziko kaj teatro iom post iom forŝovis la vivantan kaj plastikan prezentadon. Al la loĝantaro de la grandurbo, se ankaŭ ne al ĉiuj socialaj klasoj, estas ebligate, viziti teatron kaj koncerton, sed por la eksterurba loĝantaro restis ĝis antaŭ mallonga tempo, krom sporadaj aranĝoj plejofte en primitive artista maniero, nur radio kaj kinoteatro. Ĉi tiun ĉiam pli forte efikantan malbonon forigi oni komencis antaŭ du monatoj kaj fondis „Länderbühne“, prezentata de alta artista talento kaj gvidata de eminentaj reĝisoroj. Same migrantan kaj artiste eminentan teatron oni trovas jam en Germanlando kaj en Itallando, kie ili plenumas sian kulturan mesaĝon grandmezure.

Länderbühne en Aŭstrio, verko de Patrolanda helpverko „Neues Leben“, nun ekzistas pli ol du monatojn kaj dum ĉi tiu tempo estis en 45 lokoj kaj donis pli ol 220 teatroprezentadojn. En multaj lokoj la aktoroj ludis 2—3 foje. Jam la reĝisora laboro de Länderbühne, en kiu partoprenas kortega konsilisto Franz Herterich, la prezidanto de „Ring de aŭstriaj teatroaktoroj“ Hans Homma, la gvidanto de la majstroklaso por dramarto en la Statakademio prof. Klitsch, Otto Löwe, prof. d-ro Hans Nüchtern kaj Herbert Waniek, donas al la ĝis nun eble ne ankoraŭ informita publiko la certan garantion pri la altranga kvalito de la prezentadoj kaj pri la serioza celado al nova kultura trapenetrado de la loĝantaro en la provincoj.

Ĝis nun la estraro organizis 3 rondirajn vojaĝojn, el kiuj la tria daŭras ĝis mezo de januaro.

En ĉiu tia vojaĝo partoprenas vojaĝgvidanto, inspektoro, 12 aktoroj, sufloro kaj 6 surscenejlaboristoj. Ĉe la lasta vojaĝo jam kunagis kapelestro kaj malmultnombra orkestro. Ĉar tiu ĉi sufiĉe granda nombro de personaro estas multekosta, sed ankaŭ vojaĝteknike necesigas grandajn postulojn, la estraro decidis, organizi tiajn vojaĝojn kun pli malmulta personaro kaj pli malgranda dekoraciaro, kiuj povos alporti aŭstrian arton ankaŭ en la plej malgrandajn valojn de nia patrolando.

Kia alta idealismo plenigas aktorojn kaj kunlaborantojn de Länderbühne pruvu la fakto, ke ili facile kaj volonte venkas ĉi tiujn certe grandajn vojaĝ-lacigojn, ĉiamajn scenejprovojn kaj la nesufiĉan ekipon de la scenejo mem. Spite ĉiuj malfacilaĵoj de migranta teatro la aktoroj donas prezentadojn, kiuj renkontas ĉiuloke rekonon kaj entuziasmon. En ĉiuj gazetoj oni povas legi en objektiva kritiko laŭdon kaj aprobon por la aktoroj kaj teknikaj kunlaborantoj; la nombro de la vizitantoj ĉiam kreskas, ja en multaj lokoj jam longan tempon antaŭ alveno de la teatrosocieto ĉiu sidloko estas forvendita. Sed ne materia avantaĝo stimulas la personaron al ĉi tiuj bonegaj prezentadoj, sed la kontentiĝo kapabli peri al la brava aŭstria kamparanaro vere aŭstrian kulturon; kiel feliĉaj estas niaj aktoroj kaj ĉiuj kunlaborantoj, se la publiko entuziasme kaj

La aktoraro forveturas. De md. f-inoj Rosl Sladek, Anny Steidtner, Erna Perutka, s-roj Hannes Dunkel, Louis Mitznek, Valentin Lackner (sursceneja laboristo); antaŭ la vagono J. E. Kaiser.



Scenej-bildo el la komedio de Gottfried Ephraim Lessing „Minna de Barnhelm“. De md. Susi von Almaszy, Emmy Rügemann, Otto Löwe. Foto: P. Macku, Wien, 18.

plene de anima travivaĵo foriras de la prezentado kaj brilaj infanokuloj rigardas al la scenejo kaj sekvas kun ekscititaj, ruĝaj vangoj la prezentadon de belega fabelo.

Jam je la dua aŭ tria posttagmeze ĉiutage komenciĝas la fabelprezentadoj, je

Scenej-bildo el la dramo de la aŭstria klasikulo Fra Grillparzer „La ondoj de la maro kaj de l'amo“. De md. Louis Mitznek, Rosl Sladek, Franz Kutschera kaj kušante Gustav Elger Zillinger.
Foto: P. Macku, Wien, 1

la kvina sekvas por lernantoj la prezentado de klasika teatraĵo kaj je la oka la vesperprezentado. Je la duono post la dekdua nokte la aktoroj finis sian laboron kaj la teknika personaro, kiu komencis sian laboron frumatene, daŭrigas ĝin ĝis meznokto; ne havante surlokan scenejon, la arte konstruita scenejo devas esti dekonstruata, la lumigadinstalaĵoj demuntataj, la kostumoj plej zorgeme konservataj kaj la dekoracioj enordigataj. Kun la dekoracioj dumnokte rulas la dekoracivagono (1. bildo) al la stacio, por atingi frumatene jam la novan prezentadlokon. Ĝis tiam niaj bravaj pioniroj de Länderbühne povas ripozi.

Dum la dek semajnoj de la ekzistado de Länderbühne okazis naŭ unuaj prezentadoj, nome „La ondoj de l'maro kaj de l'amo“ de Grillparzer, „Minna de Barnhelm“ de Lessing; el amuzteatraĵoj „Brandner Kaspar rigardas en la paradizon“ (de Josef Maria Lutz), „La insulo“ (Harald Bratt), „La disŝirita viro“ (Johann Nestroj); je fabeloj „Ruĝkapulino“, „Dornrozetulino“, „Sinjorino Holle“. Se oni donas raporton pri la taskoj kaj laboroj de Oesterreichische Länderbühne, oni ne devas forgesi pri la multaj, bravaj volontuloj, kiuj en plej malegoisma maniero servas al la celoj de Länderbühne, la administrantoj de V. F.-verko de „Nova Vivo“, la kulturreferantoj, la distriktaj kaj lokaj gvidantoj de V. F. kaj multaj nenomitaj.

Ĉi tiu raporto altiru ankoraŭ multajn milojn kiel favorantojn kaj adeptojn de Länderbühne, por ke ĉi tiu verko kresku kaj ligu per la komuna travivaĵo de la komuna admiro al niaj hejmlandaj poetoj kaj artistoj unuigan ligilon al nia patrujo AŬSTRIO.

Spritaĵoj ...

En gastejo.

„Kiel mi vidas, vi havas bonegan apetiton.“

„Ne menciinde, vi nur rigardu, kiam mi estas gasto.“

Eminentaj virinoj aŭstriaj.

Parolado el Radio-Wien, farita de prof. d-ro **Brunhilde Flasch** la 8. de januaro 1937.

Antaŭ ol ni parolu pri aŭstriaj eminentaj ...inoj, ni deziras konstati, en kio vera ...enteco de virino sin prezentas. Certe ...nur povas esti la plenumo kaj realigo ...la sankta ideo, laŭ kiu Di-Kreinto ĝin



...no Alwine Dollfuß, vidvino post nia martira ...celiero d-ro Engelbert Dollfuß, ĉeestas la ...adon de la sonoriloj por Seipel-Dollfuß-...ileo-Preĝejo. Inter la sonoriloj s-ino Doll-fuß, md. ŝia filineto.

...tis. Do tiuj virinoj estos la plej eminen-..., kiuj plej fidele plenumas la taskon, ...stinitan por ili de la Providenco. Medi-...te pri la rolo de la virino, ni vidas la ...stinon de la virino en la homaro kiel ...zon, tiun de la viro kiel la kulminacion. ...l vera eminenteco virina ne prezentiĝas ...blike, ĉar laŭradike ĝi kreskas en la ...fundon, en la nevideblan malhelon de ...fruktodona tero. Do la unua eco de la ...rino estu la sindediĉo al nepublikeco. Kaj ...dua eco karakteriza venas el la medi-...o, ke ĉiuj estaĵoj, vivaj kaj senvivaj, ...as servi harmonie unu la alian: la tuta ...ko servas al Dio kaj la unuopaj estaĵoj ...ŝtono, planto, besto, homo servas unu ...alian. Do ni konstatas, ke la dua eco ...la virino estu la sindediĉo al servado. ...ĉi tiuj du ecoj montriĝas la vere giganta respondeco, ŝarĝita sur la virino, laŭ kiu ŝi povas pruvi veran eminentecon. La virino restu radiko laŭ sia destino kaj ne deziru fariĝi krono, ĉar alie la vivo en la arbo mortus. Kaj kiam la virino forlasos la servadon al la homaro, la homaro ne plus servados al Dio kaj tio signifos pereiĝon. La servema sintenado de la virino ja devas esti modelo por la servema sintenado de la tuta homaro al Dio. Tiel ni prijuĝas kaj asertas la inan subiĝon kiel nature donitan indon. Kaj la lasta kompletiga eco estas la kun-agado de la virino en la agado de aliaj. En la agado de la virino la plej bona estas, ne, ke ŝi memstare agas, sed kun-agadas. Por tio kaj nur por tio la viro bezonas ŝian subiĝon, ĉar la kun-agado de la virino estas necesega por la viro; per ĉi tiu kunagado la virino estu la vere helpanta kunulino al la laboranta viro. Se ankaŭ ŝia kun-agado ne estu sufiĉe atentata, ŝia destino estas helpi la viron per ama sindediĉo.



Federacia kanceliero d-ro Kurt von Schuschnigg en sia hejmo. Sidantaj s-ino Herma von Schuschnigg, sekve de akcidento elmondiĝinta, kaj filo Kurt.

Princino Fanny Starhemberg parolas al la virinoj en Viena distrikto Ottakring.

Vera eminenteco de la virino devas montri ĉi tiujn tri ecojn laŭ Dia ordono.

Aŭstrio estas riĉe benata je tiaj virinoj. Kaj se ni deziras nomi kelkajn tiajn eminentajn virinojn el nia patrolando, tio ne okazas nur por nomi ilin, sed por montri, ke ĉe la virinoj aŭstriaj la cititaj virtoj en plej bela harmonio estas troveblaj.

La eminenta, tutmonde konata, nun jam elmondiĝinta aŭstrianino **Marianne Hainisch**, la batalantino por la egalrajteco de la virino, estis la ĉiama protektantino kaj helpantino al ĉiuj helponserĉantinoj. Ŝia eminenta spirito kaj emociiga bonkoreco igis ŝin saĝa konsilantino de ĉiuj, kiuj konfideme sin turnis al ŝi.

...anoj en kostumoj, venintaj el ĉiuj partoj de la aŭstria landaro, ...acias al sia Landpatrino kaj transdonas donacojn kaj bondezirojn ...s-ino Leopoldine Miklas. Ĉeestas nia altŝatata Federacia ...ezidanto s-ro Wilhelm Miklas, la protektoro de Int. Esperanto-Muzeo kaj de 28-a Univ. Kongreso de Esperanto en Wien.



En la antaŭsalonego de Operdomo okazis festludo por la helpverko „Kristnasko en la hejmlando", ĉe kiu ĉeestis de md.: Instruministro d-ro Pernter, s-inoj Bella P e r n t e r, Leopoldine Miklas, kanceliero d-ro von Schuschnigg, Financministro d-ro Neumayer, Statsekretario por Eksteraj Aferoj d-ro Guido Schmidt.

S-ino Josefine Schmitz, la edzino de Urbestro de Wien, eksvickanceliero Richard Schmitz.

Kiel anĝelo, ĉirkaŭradiata per la glorkrono de vera „Caritas“, aperas antaŭ niaj okuloj la bildo de **Herma von Schuschnigg,** la aminda, bedaŭre tro, tro frue elmondiĝinta edzino de nia multŝatata kanceliero. Estis la suferantaj, malsataj infanoj, kiujn ŝi speciale prizorgis, kaj ŝi ne ĉesis admoni, alvoki, petegi: „Invitu malsatajn infanojn al tagmanĝo.“

La zorgema edzino de nia multŝatata Federacia Prezidanto **Leopoldine Miklas** simboligas la „Sindediĉon de la virino al nepublikeco“. Ŝi nur deziras esti patrino, patrino de siaj propraj infanoj kaj tamen estas la patrino de ĉiuj aŭstrianoj. Beno eliĝis de ŝi, kiu mildigas la mizeron kaj sekigas larmojn.

La vidvino de nia tiom priplorata martira kanceliero **Alwine Dollfuß** restis spite sia profundega ĉagreno la bona genio de Aŭstrio. Ŝia agadkampo estas bonkoreco, amo, kompato, flegado kaj prizorgo de la plej mizeruloj.

La admirinda **princino Fanny Starhemberg,** konsilantino kaj gvidantino de ĉiuj virinoj, kiuj devas plenumi en la politiko kaj la publiko specialan mision, gvidas la „Virinan Servadon por la patrolando“. Ŝi nomis Aŭstrion la „Edenon de Dio en la koro de Eŭropo“ kaj sian vivlaboron ŝi vidas en tio, havi la okazon kunlabori en ĉi tiu edeno.

La zorgo por vera familispirito, por helpanta amo al la kunhomo per la benriĉa instalado de Joseftisch-helpverko, por doni tagmanĝon al la malriĉa intelektularo, estas la plej preferata tasko de la ĉiam helpopreta edzino de nia multŝatata urbestro de Wien **Josefine Schmitz.** En komuna laboro kun la edzino de la instruministro Bella Pernter ŝi daŭrigas la verkon de Herma von Schuschnigg.

Kaj por **Bella Pernter** validas la eldiro de Le Fort „kie la virino agas laŭ sia Dia destino, ŝi ne plu estas ŝi mem, sed nur dediĉita al la Dia volo; tiam ŝi ne plu havas propran agadon sed nur kunagadon kun la agado de aliaj kiel helpantino. Ŝi ne plu havas propran ĝojon, sed nur kunĝojon; ne plu havas propran doloron, sed nur kompaton“.

Kiel subtile simboliĝas ĉi tiu „kompato“ kun la mizeraj, preskaŭ malesperantaj patrinoj en la granda „Porpatrina Helpverko“, estrata de la malegoista eminenta aŭstrianino **Mina Wolfring.** La patrolando ŝuldas multan dankon al ŝi pro la vere oferema agado.

Kaj la gvidantino de la katolika feminismo en Wien urba konsilantino d-rino **Alma Motzko,** kiu sur la politika kampo fariĝis pioniro de nobla virinismo, enprofundigis la patrolandan sentemon en la korojn de la virinoj, kolektis en politike danĝera tempo la virinojn kaj donis al ilia politika volo realan, socian formon.

Sed la vere eminentaj virinoj de nia popolo ne nur estas la ĵus cititaj, konataj de ĉiuj civitanoj, sed ili estas la aŭstriaj patrinoj, ĉiuj tiuj nekonataj patrinoj de multaj infanoj, kiuj memkompreneble fordonacas siajn fortojn, por flegi la junan estaĵon kaj ĝin eduki per penplena laborado. Sed al ili apartenas ankaŭ la seninfanaj virinoj, kiuj kunlaboras en ĉi tiu tasko laŭ la patrina sento de sia koro.

Kaj ĉi tiu patrina eco ne estas efemera, ne ligita al rapide forfluganta tempo, ĉar la patrino estas tiu, kiu venkas la tempon.

Fotoj: Dietrich & Co., Wien, VII.



Herma von Schuschnigg-hejmo de „Porpatrina helpverko de V. F.“. Konsilantino de Urbo Wien Mina Wolfring. Kanceliero d-ro von Schuschnigg vizitas la hejmon kaj parolas kun la infanoj.

9-a Brazila Kongreso de Esperanto.

Originala mallongigita raporto.

La 12.—17. XI. 1936 okazis sub la protektado de la Prezidanto de Brazilo, d-ro Getulio Vargas, kaj sub la honoraj prezidantoj s-roj Prezidanto de Ĉambro de Deputitoj, ministroj de Edukado, Eksterlandaj Aferoj kaj Trafiko kaj la urbestro la 9. enlanda kongreso.

Partoprenis 200 kaj aliĝis du oficialaj departementoj kaj 23 ne-esper. societoj. Specialaj gastoj estis nia nestora pioniro d-ro Odo Bujwid el Kraków, Pastro prof. Stelacci el Italujo kaj Argentina E.-Kolegio el Buenos-Aires. 11 brazilaj ŝtatoj nomis reprezentantojn.

Ministro de Trafiko permesis al la prez. de Brazila Ligo Esp. senpage telegrafi por la kongreso dum du monatoj en la lando mem kaj ankaŭ la respondoj estis senpagaj; la telegramoj kvazaŭ estis oficialaj.

La kunsidoj okazis en la palaco de l Ministro por Eksteraj Aferoj kaj en ti bibliotekejo estis ekspozicio de esperantaj la ejoj propramove disponigitaj de la kan celiero J. C. de Macedo Soares, nomat „Ambasadoro de la Paco“. La malferma kunsidon prezidis anstataŭ la ministr konsulo d-ro J. Guimaraes Rosa kaj f ferman la kanceliero mem, je kiu okaz univers. prof. E. Backheuser, la prez. d la kongreso, faris belan paroladon. L kunsidon je memoro al la 30-a datreven de la deklaro de Esp. kiel „lingvo klara por la telegrafo en Brazilo prezidis r prezentanto de s-ro ministro de Trafik

Kanceliero Soares proponis publikigo de ilustrita gvidlibro en Esperanto pri R de Janeiro kaj ĝin eldonis fakte gran formate kun belaj bildoj sur pli ol 30 paĝ krome 14 pĝ. E.-tekston la Ministerio p Eksteraj Aferoj je sia kosto en la ŝtata prese

S-ro ministro de Trafiko konsentis 50 rabaton sur la fervojo, eldonigis dum 9 Intern. Specimena Foiro de Rio-de-Janei novan poŝtmarkon, similan al la pasintja kun vortoj en portugala lingvo kaj Esperanto kaj ordonis la presigon speciala poŝtmarko, memoriganta la 9-a Brazilian Kongreson de Esp.!

Reelektita estis d-ro A. Couto Fernand kiel dumviva prezidanto de Brazila E.-Lig Post raporto de la ĝeneralsekretario pr d-ro Porto Carreiro Neto kaj klarig vortoj de prof. Bujwid aliĝo al l Esperanto-Ligo estis decidita.

La kongresanoj ankaŭ estis gastoj de ambasadoro d-ro Thadeu Grabowski tetrinkado; la sekretario ilin bonvenigis Esperanto.

Ni aldonas, ke ĉiuj nur kun granda feli kaj admiro povas gratuli al la brazil samideanoj. La redakcio.

Du gravaj okazontaĵoj en 1937

Ĉiu ĉeestu, ŝparu jam nun!

Kiu ne ankoraŭ revis pri Parizo?

Jen okazo veturi tien, por ĉeesti gravan „Internacian Konferencon“ sub titolo. **„Esperanto en la moderna viv** de 14.—17. de majo.

4 komisionoj zorgos pri jenaj fakoj:

„Esperanto en la lernejoj“

„Internacia Trafiko“

„Sciencoj kaj Teknikoj“

„Intelektaj interŝanĝoj“.

Ses homoj gvidos la aranĝon: Pre André Baudet, vicprez. Ernest Archdeaco Louis Bastien, ĝen. sekr. Pierre Petit, ĝe kas. C. Rousseau. Ĉi tiuj homoj, meritit en Esperantujo, garantias bonegan su ceson.

